M.15122:1.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

(översättn. 1 sida)

Island

uppt. år 1952

Svar å LUF 85 rör. hästkött och hästslakt m. m.

s. 1.

BJÖRN P. BLÖNDAL
HVAMMSTANGA
ISLAND

Island

M. 15122:1

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet

78

Hvammstanga Islando 18/7 1952

Universitato de Lund

Etnologia Arkivo

Finngatan 8. LUND Sverige

Estimataj sinjoroj!

Kiel respondo al via enketo pri buĉado de ĉevaloj, kaj manĝado de ĉevaloviando, mi informas vin jene:

1. Pri antaŭa kaj nuna opinio pri ĉevaloviando:

En mia juneco ( mi naskiĝis en 1888 ) nur kelkaj el la plej malriĉaj homoj manĝis ĉevaloviandon, kaj la ĝenerala opinio estis tute kontraŭ uzado de ĉevaloviando kiel manĝaĵo, mi kredas precipe pro religiaj kaŭzoj, eble pro tio, ke kiam la Kristanismo estis enkondukita en Islandon, en la jaro 1000, la islanda parlamento "Alþing" malpermesis per leĝoj, manĝadon de ĉevaloviando kaj mortigado de ĵusnaskitaj infanoj, ambaŭ aferoj estis laŭ tio egale krimaj.
Nuntempe kontraŭe, la ĉevaloviando estas konsiderata tre bona kaj nutra manĝaĵo kaj estas ĉie manĝata.
Tamen ankoraŭ ekzistas kelkaj homoj kiuj ne povas toleri ĉevaloviandon, kaj inter tiuj estas mi mem, mi abomenas ĝin tute egale kiel hunda aŭ kata viando.

2. Pri mortigado de ĉevaloj hundoj kaj katoj.

Mortigado de tiuj bestoj neniam kaŭzis ian socian malhonoron.

3. Ĉu ekzistis speciala persono por buĉi ĉevalojn k.t.p.

Ne ekzistis iu speciala persono kiu havis tiun taskon.
La posedanto plej ofte faris tion mem, aŭ kun helpo de najbaro laŭ cirkonstancoj, ĉar estis nur necesa devo forigi tiujn bestojn kiam ili fariĝis maljunaj.

4. Kiamaniere okazis mortigado de tiuj bestoj:

En la malnovaj tempoj oni mortigis la ĉevalojn, kiel ankaŭ la ŝafojn, per simpla tratranĉo de la gorĝo, sed nuntempe oni mortigas ĉiujn bestojn per pafo.

Antaŭe oni pendigis hundojn kaj katojn, sed nun oni pafas ilin.

Kun plena estimo

via Björn P. Blöndal

Island

M. 15122.

FOLKLIVSARKIVET
Institutionen för folklivsforskning vid Lunds universitet
78

1. Förutvarande och nuvarande mening om hästkött

I min ungdom (jag föddes år 1888) åt endast några av de fattigaste människoona hästkött, och den allmänna meningen var absolut emot användningen av hästkött som föda. Jag tror det var i synnerhet av religiösa skäl, möjligen därför att när kristendomen infärdes på Island, år 1000, förbjöd det isländska parlamentet "Alting" genom lagar förtärandet av hästkött och dödandet av nyfödda barn, båda dessa saker lika kriminella.

nuförtiden - däremot - betraktas hästköttet som mycket bra och närande föda och förtäres överallt.

Det finns likväl några människor som inte kan tolerera hästkött, och bland dem finns jag själv. Jag avskyr det precis lika mycket som hund- eller kattkött.

2. Beträffande dödandet av hästar hundar katter

Dödandet av dessa djur har aldrig förorsakat någon social vanära.

3. Har det funnits någon särskild person för att slakta hästar etc

Det har inte funnits någon särskild person som har haft denna uppgift. Ägaren har oftast gjort det själv eller med tillhjälp av någon granne allt efter omständigheterna, ty det var bara en nödvändig plikt att tillintetgöra dessa djur, när de blivit gamla.

4. Hur skedde dödandet av dessa djur?

I gamla tider dödade man hästar precis som får genom ett enkelt snitt i halsen men nu förtiden skjuter man alla djur.

Förr hängde man hundra och katter men nu skjuter man dem.